TEA-BULTENO

12ª JARO | NOVEMBRO - DECEMBRO 2009 | NUMEROJ 11-12

Mem oni lernas vivi: ne ekzistas por tio instruistoj.
Mario Rigoni Stern (1921-2008)

Al la legantaro

Intensas la aktiveco dum ĉi lastaj monatoj de la jaro, cele al celebrado de la 150-naskiĝdatreveno de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Kiel same tra la tuta mondo, ankaŭ en Triesto oni estas organizanta eventojn por lin honori. Du fakte estos, divers-date kaj -loke, la araĝoj, en novembro kaj decembro, dediĉitaj al la Majstro.

Tamen jam en oktobro oni parolis pri li: tio estis dum la kunveno "Hiperhavenoj, internaciaj literaturaj haltejoj" (*Iperporti, scali internazionali di letteratura*), organizita de "Casa della Letteratura", kuniĝo de 14 kulturaj triestaj asocioj, el kiuj ankaŭ nia TEA. Vendredon la 30ª de oktobro, ĉe la Antikva Kafejo S. Marko, okazis premiera prezento de la libro de Roman Dobzryński "Strato Zamenhof", en la italversia traduko (*Via Zamenhof*) de Michela Lipari kaj Filippo Franceschi. La publiko, nombra kaj scivolema, havis la eblon alparoli kaj la polan aŭtoron kaj la italan tradukintinon. Tio estis nur unu parto de kompleksa programaro, kiu disvolviĝis dum tri tagoj, parte en la Supera Lernejo pri modernaj lingvoj (matene) kaj parte (posttagmeze) ĉe la Kafejo S. Marko. Pri la kontentigaj rezultoj de la tuta, sufiĉe ampleksa araĝo, estas dankinda, grandprocente, la TEA-prezidanto, kiu, streĉe kaj energie, laboris por ties sukceso.

Sed kio pri la organizotaĵoj? Unue, kun subteno kaj patroneco de Triesta Komunumo-Sekcio Kulturo, okazos ekspozicio pri la vivo kaj pensoj de LLZ, kun titolo: "ANTAŬ 150 JAROJ NASKIĜIS LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF", ekde la 21ª de novembro ĝis la 8ª de decembro (vizithoraro - ĉiutage 10-13; 17-20) en Salono FITTKE, eksa "*Albo Pretorio*", piazza Piccola 3, malantaŭ la Urbodomo**.** Varme ni invitas vin ĉeesti la **inaŭguron, vendredon la 20ª de decembro, je la 17.30 h**.

Due, **ĵaŭdon la 10ª de decembro, je la 17ª h**, ĉe la Muzeo de Hebrea Komunumo "Carlo e Vera Wagner" (Via del Monte 7), prelegos pri la temo: LAZZARO LUDOVICO ZAMENHOF - EBREO E CITTADINO DEL MONDO, INTERPRETE DELL'EMANCIPAZIONE EBRAICA E DELLA LIBERAZIONE DEI POPOLI, d-ino PhD Tullia Catalan, universitato de Trieste; d-ro Federico Gobbo, universitato de Insubria, Varese; Michela Lipari, Roma kaj Prof. Carlo Minnaja, universitato de Padova. Temos pri vere grava evento, kiun certe ne necesas reliefigi, tial ni atendas vin multnombraj.

Ĉi tiuj du okazaĵoj postulas/os grandan strebadon, kaj, por ilin realigi, estas bezonata ĉies kunlaboro. Plie, ĉefe por la ekspozicio, nepras helpo dum muntado (kaj malmuntado, je la fino!), kaj dum la vizithoroj necesas ke unu-du el ni ĉiam ĉeestu. Estos farita listo de deĵorontoj: espereble ankaŭ via nomo aperos en ĝi.

Do, tia la programo pri festado de LLZ en la du lastaj monatoj de la jaro: bonvolu ĉion ĉi disvastigi, pri ĉio disinformadi, por ke tiom da laboro havu ian pozitivan sekvon. Pri enkluba programo, legeblas lastpaĝe de ĉi Bulteno: mi rekomendas - se vi havas ian ajn ideon pri kiel plibuntigi nian programaron, mi estas je via dispono. Dankon!

Baldaŭ finiĝos la 2009ª jaro, kiu, por triesta esperantistaro, estis laborplena, ĉefe pro la organizado de IFEF-kongreso, sed feliĉe, ni homoj estas forgesemaj (*precipe je mia aĝo, kiam oni facile konfuzas arteriosklerozon kun pretekstita streso*) kaj nun, ke tiu evento jam estas for, oni ne plu pensas al ties negativaj flankoj, nome al la mamuteca laboro, al la abunda ŝvitado, ne nur pro la arda varmo, al la streĉaj momentoj dum kiuj oni sin demandis, kial oni ne evitis entrepreni tian aventuron... Ŝajnas nun liliputaj kaj bagatelaj tiuj suferoj antaŭ-, dum- kaj post-kongresaj - restas en la memoro nur la pozitivaj aspektoj, la brilaj rezultoj, la dankvortoj de kongresintoj: ĉio alia jam dronis en la forgesujo.

Ja, bonas ke tiel estas, alimaniere oni ne emus rigardi al estonto kun espero kaj ĉiam kun novaj projektoj en la kapo, kiel se alia celpunkto starus tie, ĝuste tie, antaŭ oni, superenda, facile superebla... Ne validas por ni esperantistoj la ideo de stagnado en marĉo, kie atendi, senmove kaj malkuraĝe, ke koto surkovru kapon ĝis sufoko... Eble ne ĉiam la metodoj estas la plej taŭgaj, la plej efikaj, foje ŝajnas eĉ ridindigaj, sed la intenco, kiu antaŭenpuŝas kaj donas forton, estas ĉiam la sama, ne ŝanĝiĝis tra la jaroj, tra la jardekoj. Ankoraŭ multo direndus pri ĉi temo, sed prefere mi finu per ĉi, daŭre validaj, vortoj de nia LLZ: *Mi forĝis, kiel forĝisto aŭ seruristo, la ŝlosilon de l' mondo. Ĝin prenu per manoj kaj malfermadu la barilojn al la homaj koroj. Tiel vi ŝanĝos la mondon.*

Via Elda

Dum la ĵus pasinta somero, pluraj el vi partoprenis en esperantistaj renkontiĝoj, sed - bedaŭrinde! - nur unu raporto atingis la triestan redaktanton. Bedaŭrinde, jes, ĉar ĉiam estas interese legi pri impresoj de geamikoj okaze de tiu beletosaj kunvenoj, ĉefe por homoj kiuj, pro diversaj kaŭzoj, ne havis la ĝojon mem ĉeesti. En la maja-junia **Tea-Bulteno** *vi certe (*espereble!) *legis la vortojn de nia kara amiko Martin, pri liaj esperoj, sentoj, timoj antaŭ ol partopreni la Italan Kongreson de Esperanto, en Cassino* (Kasino)*, urbo en la Latia regiono, kiu - kun ties ĉirkaŭaĵoj - estis eldetruita en la*

unuaj milit-monatoj de 1944, tiel kiel la monaĥejo Montecassino, tie starigita jam en 529ª jaro de Sankta Benedikto de Norĉja.

Aŭstro partoprenis kongreson de varmeco en: Montecassino!

Pri mia aparta motivo mi skribis jam en mia antaŭkongresa raporto pli detale. Konvenis la okazigo de la itala nacia Esperanto-Kongreso ĝustaloke – en Montecassino! Montecassino ja "famiĝis" en la Dua Mondmilto, atingante la kvinan "teruran" gradon! Antaŭ 65 jaroj – 18-jarulo - mi ĝisvivis tie la inferegon sur- kaj eĉ en-teran! Priskribi ĉion ĉi apenaŭ eblas – kaj tutcerte ne en limigita artikolo. Kion signifas vera milito, ja povas kompreni nur samsortuloj! "Dio kun ni" (*Gott mit uns*) estis skribite sur niaj zonaj bukoj! Ĉu ne ironio, konsiderante ke ĉiupaŝe frontis nin la morto – aŭ ĝuste pro tio?

Tri ekstremaj travivaĵoj okazis al mi en kaj proksime al Montecassino! Tiam evidente Dio kaj gardanĝelo akompanis min. Temus pri vere tro amplekksa raporto! Kaj ĉu serĉi realajn klarigojn? Konkretaj lokoj ne plu troveblas, sed certe la kavernoj en la proksima montaro ankoraŭ ekzistas!

Nun mi povas limiĝi al la realigo kaj vidpunkto de eksterlanda partopreninto, kiu cetere jam spertis multnombrajn diversajn aranĝojn. Legintoj de mia antaŭkongresa raporto jam scias kaj certe pli bone komprenas la kialon. Cetere, post la realigo de tiu ĉi evento, mi povas tuŝi pli libere miajn iamajn travivaĵojn kaj konforme raporti pri la nunaj impresoj. Sekve persekutis min, krom psikaj, ankaŭ fizikaj problemoj. Nur persiste mi fine privenkis ilin! En postmilitaj kursoj mi kontaktis prelegantan psikologon, kiu avertis min pri vizito de tiuj "memorindaj" lokoj! "Gastaman" akcepton mi ne atendu, rememorante la spertojn en Skandinavio, kie mi volis nur foti tombojn de falintoj, laŭ peto de parencoj. Jam, post ke mi demandis informojn, mi tie renkontis - ne nur nordan - „froston"!

Surprize inversa estis la atmosfero en Montecassino! Ne nur la regantaj temperaturoj, ĝis 39°, sed, antaŭ ĉio, la homeca varmeco kortuŝis min. Aliĝinte la italan E-kongreson, mi esperis je helpo de miaj italaj geamikoj! Montriĝis, ke ne hazarde agadis/as italoj en la prezidio de UEA: D-ro Renato Corsetti, Michela Lipari, Edvige Ackermann, la ĉefdelegito Mario Amadei; krome partoprenis la Honora Prezidanto de IFEF, d-ro Romano Bolognesi! Entute agadas tre kapablaj ges-anoj en IEF.

En TV brile okupis la "bonŝancan lokon", s-ino Laura Brazzabeni. *Efika publika reklamo*!

Gastpreleganto estis la eminenta polo, s-ro Roman Dobrzyński.

LKK prezentis tre riĉan programon, kiun la partoprenantoj vigle profitis – eĉ nokte! Dokumentas ĉion la kongresa raporto/protokolo de la LKK-prezidanto d-ro Renato Corsetti! En ĝi li cetere nomis min, "Stelo de Montecassino"! Sed mia stelo ekbrilis nur dank' al la sindona subteno de la jam cititaj geamikoj. Por atingi mian celon "Monte Cifalco"* – nun kovrita plejparte arbare - mi interesiĝis pri la busa horaro. Tie mi ja pasigis milite preskaŭ 2 monatojn - pli-malpli ŝirmita - en kaverno(j).

Triestanino, Edvige Ackermann, solvis la aferon pli praktike, dank' al la bonvolemo de s-ino Michela Lipari, kiu ĉeestis aŭtomobile. Evidente ŝi posedas ankaŭ sepan senson, ĉar ŝi trafe demandis pri mia celo policanon, kiu montriĝis ege afabla kaj prizorgis eĉ kompetentan gvidanton, kiu venis per propra aŭtomobilo. Temis pri la zorganto de la germana milittombejo – s-ro Walter Janetta!

Kiel germanparolantoj, ni du daŭrigis, per lia aŭtomobilo, surmontan ŝtonegan vojon, kiun ni frekventis siatempe piede, plejparte pli rekte - iom helpe de muloj. Malgraŭ la duboj de la germano, Michela Lipari brave sekvis nin eĉ kvarope: kun Edvige Ackermann, d-ro Romano Bolognesi kaj Roman Dobrzyński. Ĝenerale li ne alte taksas ŝoforinojn, sed Michela estas laŭ li "escepto", konsidere la aĉan alpan vojon! Post la prezento de la kunveturantoj li konfesis al mi, ke tian unikan grupon li ankoraŭ neniam renkontis! Atinginte la kavernojn, kiujn mi ekkonis, s-ro Roman Dobrzyński, la konata pola filmisto, tuj ekagis! Jen sekvanta surprizo, al kiu mi tute ne estis preparita. Mi do respondis kaj rakontis ĉion laŭ "konservita memoro"! Kvankam laŭ la iamaj konsiloj de psikologo, mi strebu forgesi ĉiujn tiujn travivaĵojn! Ĉar, revizitante la lokojn, oni povus re-fali en la saman staton! Sed mia akcepto, akom-panado de helpemaj geamikoj okazis en vera senco de "varmeco"! Do, ne restis ŝanco al "refalo"! Ja ankaŭ la civitanoj de la tuta regiono estas mirinde afablaj! Konsiderante ĉion ĉi, mi supozeble revenos al la maja memorkunveno, al kiu gastame invitas la urbestro de Montecassino!

Eble mi renkontus "iaman konaton"? Sed, ĉiukaze, la nuna Montecassino mem valoras reviziton!

Kiel Honora Membro de IFEF, mi nur bedaŭras ke ĝi koincidos kun la 62ª IFK, okazonta en Sofio! Kion fari? Gratulon al IEF kaj refojan dankegon al ĉiuj!

Septembre 2009 - Martin Stuppnig mastuppnig@gmx.at

* N.d.r. *Monte Cifalco* (Monto Ĉifalko), alta 947 m-ojn, situas je deko da kilometroj norde de *Cassino* kaj superregas pasejon inter du valoj. La montaj deklivoj, alrigardantaj tiun urbeton, estas krute rokaj, ĝis 200-metra alteco, tial malfacile konkereblaj. La malantaŭa flanko de la monto, male, estas karakterizata de serio da ebenaĵoj kaj valetoj. De la montopinto eblas spekti vastan panoramon al la subaj valoj: nur post grimpado ĝis tie, oni povas bone kompreni pro kio germanoj elektis tian pozicion. Monto Ĉifalko estis ĉarnira punkto de la potenca Defendlinio Gustav. En ĉi tiu historia teritorio eblas surpaŝi nombrajn padojn, laŭ diversaj itineroj, por kompreni kaj konsciiĝi unu fojon plian, ke, de tempo al tempo, indas reiri la pasintecon por ne forgesi...

Trafoliumante libron de historiaj rememoroj

Triesto kaŝita

La Palaco "Mil kaj unu noktoj"

En placo de la Borso (*piazza della Borsa*), ĉe l' vojkruciĝo kun strato *Roma*, staras eleganta domo duetaĝa, nuntempe sidejo de Banko, plej konata laŭ la nomo de sia unua posedanto. Li estis la siria Antonio Pompeo Cassis Faraone (1745-1805), tre kompetenta aferisto, antaŭe vivinta en Egiptujo. Tre riĉa, li alvenis al Triesto kaj tie ĉi ekagadis en konstruada kampo. Inter alie, en 1790, li aĉetis, de Antonio Strohlendorf, vilaon Neker, kiun li pliampleksigis kaj plibeligis interne kaj ekstere. Faraone Cassis ornamis la domon per pluraj statuoj kaj la parkon per akvoludoj kaj impona oranĝerio. Alia interesa afero pri ĉi vilao, estas ke ekde 1820 en ĝi vivis diversaj Napoleonidoj, sed tio ja estas tute alia historio.

En tiuj jaroj, li konstruigis ankaŭ ĉi tiun palacon en la Borsa placo kaj ĝin plenigis per eksterordinaraj artaĵ-kolektoj. Kune kun sia edzino Tekla (*Tecla*) li kutimis sin vesti per tre riĉaj, orientstilaj vestaĵoj kaj paradi tra la urbocentro ĉi tiele: surŝutita per juvelaro, kun surkape turbano kaj ĉe la zono cimitaro, sekvata de du negretoj.

Tiu palaco iĝis kvazaŭ filio de la "Sublima Pordo"*. Tamen, post kelkjara tempo, la riĉa aferisto ekspertis malrapidete, sed nehaltigeble, iom-post-ioman malpliiĝon de siaj abundaj havaĵoj. Je lia morto, la heredintoj elvendis la fabelajn kolektojn, aĉetitajn plejparte de famaj parizaj kaj londonaj antikvaĵistoj, kaj ankaŭ ĉiujn nemoveblajn propraĵojn. Tiel malaperis, tute malpompe, unu el la plej konsiderindaj posedaĵoj tiutempaj. Tiel la mondo iras...

**Sublima [turke: Bab-i Ali] aŭ Otomana Pordo: la nomo devenas de tiu pordego, situanta en Istanbulo proksime al Topkapi, tra kiu oni pasis por aliri la ĝeneralan kvartalon de la ĉefveziro, kie la turkia sultano bonvenigis la eksterlandajn ambasadorojn.*

Monumentoj: tien kaj reen

En la unuaj novembraj tagoj de 1918ª jaro, post rea italiĝo de Triesto, oni ekforigis ĉiujn bildojn memorigantajn pri la habsburga imperio. Tiu faro ja tute normalas, en kiu ajn tempo: plejverŝajne unua onia "devo", je ŝanĝiĝo de ajna reĝimo, estas forbalai, foje eĉ per detrua ago, la spurojn de antaŭaj regantoj. Sed foje okazas mirakloj: el neniigo saviĝis la busto de Imperiestro Ferdinando la 1-a, kiu staris, rigardante dealte la urbon, inter la statuoj "Justico" kaj "Gloro" surtegmente de la vilao "*Ferdinandeo*". Ĉi konstruaĵo, konkreta esprimo de dankemo kaj amemo flanke de la urbanaro, ricevis la imperiestran nomon, post kiam Ferdinando, dum sia vizito en Triesto, jaron 1844^{an}, donacis al la urbo la tutan teritorion de *Farneto*, arbare kovritan. La projekto, verko de Friedrich Hitzig laŭ renesanca stilo, estis realigita de Giuseppe Sforzi en 1856-58. La skulptaĵoj estas de Francesco Cameroni.

Sub la marmora grupo, staras ŝtono kun surskribitaj vortoj memorantaj pri la urbanara donaco al la reganto. Supozeble tiu busto saviĝis, nur pro nescio de la detruintoj, kiuj ne rekonis la bildon de la "abomeninda tirano". Bedaŭrindas, ke plurfoje oni posedas tro "provizoran memoron" kaj entute, tiukaze, eniĝis rapide en forgesujon la realo de liaj nombraj bonfaroj al Trieste: fakte grandan elanon Ferdinando donis al la urbo, koncedinte multajn avantaĝojn en la komerca kampo.

Tiel iras la mondo: statuojn oni starigas facile, kiel same facile oni ilin malstarigas (eĉ pli simple, ĉar kutime oni ilin dispecigas!). Ŝanĝiĝas opinioj kaj ideoj, de unu tago al alia, kaj, laŭ tiu ondumanta ŝanĝiĝemo, suferas, pli-malpli, ankaŭ la monumentoj. Sed tiaĵoj ja ekzistis ne nur en tiuj momentoj historiaj de kompleta renversiĝo en politika kaj socia kampoj; foje ĉio povas dependi eĉ de nur unu "cerbo", en kiu ekbrilis iel lumilo. Flagre la ideo tuj konektiĝas kun la ĉirkaŭantaro, kiu, ĉu pro komplezemo, ĉu pro ekhavo de ia avantaĝo, ĉu pro stultemo, ĝin apogas senrezerve.

Sed ni revenu al la temo: muntado aŭ malmuntado de monumentoj. Kompreneble ankaŭ triestanoj suferis de tiu detrumania malsano en kiu ajn periodo, eĉ moderna kaj postmoderna, sed de tempo al tempo ankaŭ okazas, ke oni ree malkovru la pozitivajn flankojn de propra historio kiel habsburga urbo kaj Aŭstria haveno. Ĉu eble tiu nuna mensa malfermiĝemo estas favorata de la ideo de unuigita Eŭropo de l' popoloj? Kiaj ajn estu la kialoj, nu ni vidu kion oni ree muntis en Triesto en ĉi lastaj jaroj:

En decembro 1912, estis realigita, danke al mondonacoj de la tuta triestanaro priplorinta la morton de la kara imperiestrino Elisabeth, karesnomita Sissi, ties bronza monumento fare de la artisto Franz Siebert, kiu kromornamis ĝin, en plej eleganta Florstilo, per "Alegorio de Artoj kaj Naturo" kaj "Omaĝo de la popolo al imperiestrino". La impona skulptaĵaro estis delokigita pro politikaj kialoj en 1921. Grandceremonie, ĝi estis restarigita la 5^{an} de oktobro 1997, en la placo antaŭ la Centra Stacidomo, ĉeeste de popolamaso.

Iel similan sorton suferis la statuo de la Habsburga Arkiduko Maksimiliano. En 1875, liamemore estis starigita statuo pri li en placo Venezia (tiutempe placo Jozefino): tiam okazis solena ceremonio ĉeeste de la frato, imperiestro Francisko Jozefo. Kiel sciate, Maksimiliano, ricevinte la titolon de Meksika reĝo, estis mortpafita en tiu lando en 1867. La historio de la arkiduko estas strike ligita al tiu de Triesto, kiun li multon subtenis ekonomie, kulture kaj socie. I.a. lia plej granda donaco al la urbo estis la Kastelo Miramar' kun ties eksterordinara parko, kiu reprezentas unu el la plej ĉarmaj vidindaĵoj de triesta provinco. En 1918 lia monumento estis forprenita kaj deponita en komunumaj ejoj ĝis 1961. Tiujare oni decidis, ke pli bone estus ties starigado en lia parko apud lia kastelo, pri kies farigado tiel ame li okupiĝis.

Sed tiu ne estis la definitiva alcelo: post 90 jaroj de ekzilo en tiuj diversaj lokoj, iu vekiĝis matene kaj ekpensis ke eble estas ĝuste kaj juste, ke la memoro pri li ne disperdiĝu kaj ke la statuo estu ree lokita en sia origina loko, tie en la centra placo Venezia, vid-al-vide al la maro, kiun li ege amis, kaj la kastelo Miramar', rezidejo kiun li ne sukcesis vidi finkonstruita.

Tiel la mondo iras...

MONDA MARŜADO POR PACO KAJ NEPERFORTO

El Wellington (Nov-Zelando) la 2an de oktobro 2009 – naskiĝdato de Mahatma Gandhi, kiun Unuiĝintaj Nacioj deklaris "Internacia Tago de Neperforto" – startis tiu ĉi mondskala evento, kiu, per irado dum 90 tagoj kaj 160.000 km tra la tuta mondo, finiĝos la 2an de januaro 2010 en Sud-Ameriko.

La manifestacion iniciatis la "Humanisma Movado", organizo starigita en Argentino – fine de la 1960-aj jaroj – cirkaŭ la studoj kaj agoj de Mario Rodríguez Cobos, verkisto kaj filozofo, ideologo de la "Nova Humanismo". Kunordigis la eventon alia organizo, "Mondo Sen Militoj", fako de "Humanisma Movado", naskita post la Dua Mondmilito kiel reago al tiuj teruraj atombombadoj de la japanaj urboj Hiroshima kaj Nagasaki, kun ĝiaj ege suferigaj sekvoj por centmiloj da homoj.

Temas pri propono de senprecedenca plurforma evento, estinta dum la Simpozio de la Monda Centro pri Humanismaj Studoj en Punta de Vacas (Argentino) la 15an de novembro 2008.

Kulturaj, sportaj kaj artaj agadoj, forumoj, festivaloj, festoj, koncertoj implikiĝas en la evento, krom ĉiuj ajn kreaj kaj neperfortaj iniciatoj estigitaj fare de volontulaj unuopuloj aŭ asocioj. La okazintaĵon apogas pluraj internaciaj institucioj k movadoj, i.a. <Amnesty International>, <Greenpeace>, Universitatoj, kaj ankaŭ elstaraj homoj el scienca, sporta, spektakla kampoj, Nobel-premiitoj ktp.

Al la ĉefa itinero tra Oceanio, Azio, Eŭropo, Afriko, Nord- kaj Sud-Ameriko, kuniĝas pluraj lokaj branĉoj, tiamaniere ke la tuta Tero cirkaŭbrakiĝas per globala homara sento, promocianta kulturon de neperforto kaj defendo de homaj rajtoj.

Unu el tiuj branĉoj, venanta el Egiptujo, Proksima Oriento, Turkujo kaj Balkanoj, trairos Trieston la 7an de novembro.

Detaloj pri la triestaj eventoj certe legeblis en loka gazetaro: en placo de Italia Unuiĝo kunvenis amaso da homoj por kune estigi la plej grandan Kolombinon de la Paco.

Ĉu en tiu Monda Marŝado ne indus partopreno ankaŭ de la esperanta Movado? Aŭ ĉu esperanto jam dronis en la Granda Angla Maro? Eble. VIGLO

Mallonge pri ...

LA FILMA OFERTO DE UEA PLIVASTIĜIS

La 6an de oktobro aperis la 5a numero de la filmĵurnalo **UEAviva** kun tri eroj. Unue, Emilio Cid raportas pri la rezultoj de la informkampanjo ĉirkaŭ la 94a UK en Bjalistoko, al kiu li alvokis laŭ komisio de la UEA-Estraro maje en la filmĵurnalo. Cid estas sufiĉe kontenta pri la rezultoj kaj instigas plu daŭrigi la agadon ankaŭ nun, kiam la UK jam apartenas al pasinteco. En la dua ero, pruntita el la televida servo de UN, oni vidas elpaŝon pri lingvaj rajtoj fare de la UEA-reprezentanto Mireille Grosjean ĉe la Homrajta Konsilio de UN fine de septembro. La fina parto estas dediĉita al TEJO. Oni vidas sinprezenton de la nova Estraro de la junulara UEA-sekcio en la ĵusa ARKONES en Poznano, Pollando.

La reta kinejo de UEA ĉe Ipernity pliriĉiĝis per valoraj historiaj dokumentoj. La filmo *Lingvo festis naskiĝtagon* de Michael Cwik raportas pri la impona UK de la Jubilea Jaro 1987 en Varsovio. Scenojn el la Budapeŝta UK en 1966, i.a. kun fragmento el la festparolado de Ivo Lapenna, montras la filmo *Esperanto-fonto*, kiu unuavice rakontas pri la eventoplena historio de nekutima ZEO apud la hungara ĉefurbo. La plej lasta el la novaĵoj en la reta kinejo estas samtempe la plej malnova el ili, nome dokumenta filmo pri la 48a UK en Sofio, 1963. Ĉiuj ĉi trezoraĵoj devenas el la Biblioteko Hodler, kies filmojn UEA iom post iom ciferecigas por pli facile disponebligi ilin al la movada publiko. La adreso de la reta filmĵurnalo en YouTube estas: www.youtube.com/user/UEAviva kaj tiu de la reta kinejo en Ipernity: www.ipernity.com/home/97850

120.000 ARTIKOLOJ EN LA ESPERANTO-VIKIPEDIO

Duone de oktobro, la Esperanto-vikipedio atingis **120.000** artikolojn. Nia vikipedio, laŭ la nombro de artikoloj, nun tenas la 21an lokon inter la diverslingvaj versioj; la volapukan version oni preterpasis kelkajn semajnojn antaŭe, la 22an de septembro. La 120-mila artikolo temas pri Sao Bento do Trairí, eta urbo en norda Brazilo.

La Esperanto-vikipedio ricevas tage ĉ. 160.000 vizitojn de homoj (do, sen robotoj). Per tio la Esperanto-vikipedio en aŭgusto okupis la 33an lokon - iom post la greka kaj slovaka, iom antaŭ la litova kaj serba versioj.

Kial gravas vikipedio?

La E-vikipedio havas pluroblan utilon por la E-komunumo. Unue ĝi servas kiel leksikono: fakte la unua ĝenerala leksikono dum la ĝisnuna 122-jara historio de E-sperantujo. Due, per tio ĝi subtenas ankaŭ la terminologian diskutadon kaj laboron. Trie, nia vikipedio tre klare montras al la ekstera mondo, ke Esperanto vivas ĉiutage kaj estas daŭre uzata. La lingvo Esperanto, antaŭ 122 jaroj la plej malgranda lingvo de la mondo, intertempe havas firman lokon inter la 50 plej gravaj lingvoj. Tio videblas, krom per vikipedio, ankaŭ per pluraj aliaj statistikoj kaj per la uzado en multlingvaj retejoj.

Unu kontribuo por vikipedio ĉiumonate

Por subteni la pluan konstruadon de vikipedio mi alvokas ĉiun spertan Esperanto-parolanton kontribui al vikipedio almenaŭ per eta aldono ĉiumonate. Egalas, ĉu tio estas korekteto de artikolo aŭ redaktado, ĉu tradukado el alia vikipedio aŭ verkado de komplete nova artikolo. Ĉiu kontribuo helpas daŭrigi la grandan taskon - supozeble temas pri la plej grava verkada tasko en la historio de Esperantujo. Se ĉiuj kune helpas, ni sukcesos eĉ pli bone!

Fonto: Ret-Info http://www.eventoj.hu

MALFERMA TAGO en Roterdamo

Sabaton, la 28an de novembro 2009 - La 31ª Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA , estos dediĉita al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Ivo Lapenna (1909-1987), la longtempa ĝenerala sekretario kaj prezidanto de UEA. Prof. Carlo Minnaja, prezidanto de Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna kaj redaktoro de la impona libro ESEOJ MEMORE AL IVO LAPENNA faros dum la tago du prelegojn pri la vivo kaj verko de la legendeca oratoro kaj movada gvidanto, pri kiu personajn rememorojn prezentos ankaŭ prof. Duncan Charters. Krome oni montros filmojn kun fragmentoj el diversaj paroladoj de Lapenna.

Kiel reprezentantoj de la kongreslando de la UK en 2010, vizitos la Malferman Tagon ges-roj Norberto Díaz Guevara kaj Yoandra Rodríguez Labrada el Kubo. Okazos ankaŭ prezentado de novaj eldonaĵoj, kiuj, same kiel ĉiuj aliaj varoj en la Libroservo de UEA, estos vendataj rabate. Kafo kaj teo estos senpagaj kaj, en la senpaga loterio, ĉiu gajnos ion. La programo daŭros de la 10ª ĝis la 17ª horo.

Pli frue, la datrevenon de Lapenna omaĝis speciala programero en la 94ª UK en Bjalistoko. Tie estis lanĉita ankaŭ nova eldono de ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ de Ivo Lapenna, kies unua eldono aperis en 1966. La dua eldono, 166-paĝa, estas plivastigita per la festparoladoj de la aŭtoro en la UK-oj en Helsinko (1969) kaj Vieno (1970). La libro kostas 9,90 eŭrojn (plus afranko kaj, en EU, imposto de 6%); rabato de 1/3 ekde 3 ekzempleroj.

POŜTMARKO PRI IVO LAPENNA

Por omaĝi la 100-an datrevenon de la naskiĝo de Ivo Lapenna UEA mendis ĉe la poŝta kompanio TNT poŝtmarkon kun la portreto de sia eksprezidanto. La nova marko estas lanĉita en la naskiĝtago de Lapenna, la 5an de novembro, kaj ĝia nominala valoro egalas al tiu de la enlanda afranko por letero ĝis 20-grama en Nederlando.

La poŝtmarko estas vendata en folioj kun 10 markoj, mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA. Unu folio kostas EUR 5,50 (plus afranko; kvanta rabato ne estas aplikebla).

La eldonkvanto de la marko estas limigita kaj post la elĉerpiĝo ĝi ne estos represita. Sekve ĝi rapide fariĝos dezirata objekto ankaŭ ĉe neesperantistaj kolektantoj same kiel la poŝtmarkoj lanĉitaj en 2008 okaze de la 93ª UK en Roterdamo kaj la 100-jariĝo de UEA.

Ĉi-jare aperos ankoraŭ dua poŝtmarko, kiu omaĝos la 150-an naskiĝdatrevenon de L.L. Zamenhof. Ĝi estos lanĉita en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 28an de novembro, sed antaŭmendoj estas jam akceptataj. Ankaŭ la Zamenhof-marko aperos en 10-markaj folioj kaj ĝiaj vendokondiĉoj estos samaj kiel tiuj de la Lapenna-poŝtmarko.

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA

Eblas aĉeti jam nun, ĉe libro-servo de UEA, la glumarkojn reklamantajn la UK-on en Havano. Plibeligu la kovertojn de viaj korespondaĵoj per tiu ĉi kolora emblemo!

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2010

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 61ª fojo. La rezultojn oni anoncos en la 95ª Universala Kongreso en Havano. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, escepte de infanlibroj. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Validas krome la jenaj kondiĉoj:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita;
Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj);
Teatraĵoj: maksimuma longo ne fiksita;
Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo *Interproksimigo de kulturoj*, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj); la unua premio nomiĝas "Luigi Minnaja";
Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2009. Unu premio.
Ĉiujn konkursaĵojn – en unu ekzemplero, escepte de tiuj por la branĉo Infanlibro – oni devas sendi al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio, aŭ prefere rete al la adreso: michela.lipari@tiscali.it, indikante pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro.
Filmo kaj **Kanto**: ĉi-foje, eksperimente, la juĝantaroj mem elserĉos premiindajn verkojn.
Premioj: unua premio: 240 eŭroj, dua premio: 168 eŭroj, tria premio: 96 eŭroj; Nova Talento 168 eŭroj; Infanlibro de la Jaro 504 eŭroj.

Detala regularo haveblas ĉe UEA, kaj legeblas ankaŭ ĉe uea.org/dokumentoj/belartaj_konkursoj_regularo.html.

EK - Esperanta Klavaro, versio 3.6

Post 5-jara paŭzo, Jurij Finkel ĵus aperigis la plej novan version de la konata Esperanta help-programo **EK** = Esperanto-Klavaro.
EK estas programo, kiu permesas tajpi Esperantajn ĉapelitajn literojn en ĉiuj vindozaj programoj, korekte subtenantaj unikodon (kiel *Word, Outlook, Internet Explorer, Mozilla* kaj multaj aliaj).
EK permesas uzi prefiksajn kaj postfiksajn modifajn klavojn por enmeto de ĉapelitaj literoj, kaj ankaŭ atribui ĉapelitajn literojn rekte al certaj klavoj.
Piktogramo de **EK** ĉiam rezidas en la sistema taskopleto *(system tray),* kaj vi povas aktivigi aŭ malaktivigi **EK**-on, klakinte sur la piktogramo per maldekstra musbutono.
La nova versio de **EK** (Esperanto-klavaro) estas senpage elŝutebla ĉe http://www.esperanto.mv.ru

Fonto: Ret-Info http://www.eventoj.hu

ESPERANTO SUR MURO !

Depende de via kreemo, eblas informi pri Esperanto plurmaniere. S-ro José Nobre, kiu loĝas en kvartalo Bangu, Rio de Ĵanejro, tion faris per farbado sur la muro de sia domo. Preterpasas tiun lokon po 10000 homoj ĉiutage.

Informis "Projekto Esperanto al la Publiko" (Brazilo).

Novembra Programo

3 mardo	**17h00** - Posttagmeza renkontiĝo* Kune ni lernu kaj ... amuziĝu!
6 vendredo	**20h00** - Fotoj pri iamaj tempoj, zorge de Anita
10 mardo	**17h00** - Posttagmeza renkontiĝo
13 vendredo	**14h40** - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno **20h00** - Preparlaboroj por la ekspozicio
17 mardo	**17h00** - Posttagmeza renkontiĝo
20 vendredo	**18h00** - Inaŭguro de la ekspozicio: **Antaŭ 150 jaroj naskiĝis LLZ** *Salono A. FITTKE - Piazza Piccola 3*
24 mardo	**17h00** - Posttagmeza renkontiĝo
27 vendredo	**20h00** - Fotoj pri IFEF-Kongreso 2009 kaj aliaj pri... fare de Anita

Decembra Programo

1 mardo	**17h00** - Posttagmeza renkontiĝo
4 vendredo	**20h00** - Filmo pri Bjalistoko
8 mardo	**Fermo kaj malmuntado de la ekspozicio**
9 merkredo	**14h40** - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno
10 ĵaŭdo	**17h00** - Seminario pri Zamenhof ĉe Hebrea Muzeo - Via del Monte 7
11 vendredo	**20h00** - Zamenhofa Festo - rememoroj pri lia vivo
15 mardo	**17h00** - Naskiĝdato de LLZ - legaĵoj
18 vendredo	**20h00** - **UEAviva** - filmo
22 mardo	**19h30 - Kristnaska Festo!**
29 mardo	**19h30** - **Adiaŭ, 2009ª jaro!**

Monto Esperanto, elvidejo Zamenhof en Hungario

Ne estas vaste konate, ke je ĉ. 40 km-oj apud Budapeŝto, tute oficiale ekzistas "Monto Esperanto" kaj sur ĝia pinto "Elvidejo Zamenhof". Tiuj geografiaj nomoj troviĝas ankaŭ en mapoj (vd. ekz. http://www.eszperanto.hu/eventoj/bildoj/z-kilato-monto-terkep.jpg).

Komence de oktobro, pli ol 50 esperantistoj ekskursis al tiuj monto kaj elvidejo. En tiu grupo estis kunlaborantoj de Centro Eventoj, Lingvo-Studio, instruistoj, kursanoj, skoltaj E-teamanoj, k.c.

Bedaŭrinde la elvidejo, pro ne prizorgado kaj forgeso, ruiniĝis: ĝi estis konstruita en 1973 de la Esperanto-grupo de urbo Vác. Dum multaj jaroj oni organizis la tiel nomitan "**Z**amenhofa **I**nternacia **P**aŝmarŝo"-n (*n.d.r - en 1975, partoprenis en tiu marŝo kelkaj triestanoj, inkluzive de mi*). La monto, 336-metra, ricevis la nomon "Esperanto" en 1979, okaze de tiujara Z.I.P.

fonto: Ret-Info http://www.eventoj.hu

En ĉi aŭtunaj, kvazaŭ vintraj tagoj, pli agrablas sin dediĉi al kuirada arto kaj ĉefe pretigi manĝaĵojn kuirendajn forne. Jen simpla sed tre bongusta kaj sana plado, proponenda al viaj geamikoj, familianoj...

Cepoj en forno



Ingrediencoj

1 kg	da blankaj cepoj, mezgrandaj
3 kuleroj	da raspita pano
4-5 kuleroj	da raspita parma-fromaĝo
3 kuleroj	da oliv-oleo
pinĉeto	da origano
	salo (laŭbezone)

Lavu la cepojn kaj ilin tranĉu kvarone. Oleumu fornan ujon, prefere rektangulan, kaj dismetu la cepojn en nur unu tavolo, surŝutetu per salo kaj iom da origano. Surverŝu raspitan panon kaj parman fromaĝon. Kovru la ujon per stanfolio kaj la tuton enmetu en la fornon, jam varmigitan ĝis 200 gradoj. Kuiru dum ĉirkaŭ 15 minutoj kaj poste kontrolu ke cepoj ne tro sekiĝu; se bezonate, aldonu duonan glason de varma akvo. Daŭrigu la kuiradon pluajn 15 minutojn. Fine deprenu la stanfolian kovraĵon, kontrolu la kuiriĝ-atingon, kaj plibrunigu la surfacon dum kromaj dek minutoj. Surtabligu la ujon kaj ... bonan apetiton!

Ridu, ridu!!!

Plenumi deziron

Renkontiĝis germano, ruso kaj judo. Malsupreniris al ili la anĝelo de Dio kaj diris:

- Mi povas plenumi po unu vian deziron.
- Mi deziras, ke ne estu komunistoj, diras la germano.
- Mi deziras, ke ne estu faŝistoj, diras la ruso.
- Nu, kion diri? diras la judo. - Se Vi plenumos iliajn dezirojn, do mi petas por mi taseton da kafo.

(Mal)amo al judoj

Tio okazis en Francujo inter la du mondmilitoj. Maljuna judo, portanta du grandajn tekojn, eniras stacidomon en Tuluzo. Li aliras lokan viron kaj demandas lin: "Kion vi opinias pri la judoj?"

Tiam respondas la franco: "Oh, mi alte taksas la judojn. Ili havas belan kulturon!"

La judo trovas alian francon kaj prezentas al li la saman demandon. La viro respondas: "Mi tre amas la judojn. Ili estas talentaj kaj diligentaj!"

La judo serĉas alian viron kaj demandas lin: "Kion vi opinias pri la judoj?" Respondas la franco: "Mi malamegas ilin, ĉiujn ilin!".

Tiam la judo diras al li: "Tre bone, sinjoro. Mi vidas ke vi estas honesta homo. Bonvolu, do fari al mi komplezon kaj gardi miajn tekojn dum mi iros al la necesejo."

El la listo "Amantoj de judaj humuraĵoj"

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
tel/fakso: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349